Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 3 N° 1 - jan. 1983

Kara Leganto,

Jen nova jaro, nova etapo al la "fina venko".

Ke 1983 rezervu al vi kaj al viaj karaj ĉion deziratan kaj al ni ĉiuj, batalantoj por la "bona afero", la necesan kuraĝon kaj la sopiratan sukceson.

Retrorigardante al la pasinta jaro, ĉu ni povas esti kontentaj ?

Jes, ŝajnas al mi.

La Universala Kongreso, n i a Universala Kongreso, estis sukcesa, kvankam ege nervostreĉa. Sed malgraŭ ĉio, ĝi ne alportis - kion ofte kaŭzas tiaj okazaĵoj - ajnan malamikecon. Male, ĝi fortikigis la amikecon kaj kreis novan.

Krom la UK, 1982 ankaŭ estis sukcesa ali-terene. Ni pensu nur pri niaj kadro-kursoj. Ili alportis al ni dudekonda pliaj kadromembroj el kiuj kelkaj jam okupas gvidan postenon sur landa nivelo.

Plie, ke niaj kadrokursoj estis sukcesaj pruvas la fakto ke UEA pretis atenton al ili kaj eĉ propagandis ilin en sia revuo ESPERANTO.

Plia pruvo de sukceso estas la organizo de kromaj kadrokursoj internaciskalaj en la trilanda angulo Aachen-Liège-Maastricht.

Ankoraŭ plia pruvo estas ke reagoj venis de diversaj flankoj, el diversaj landoj. Pluraj jam mendis la kursotekstojn.

Ĉu, do, ni ne povas diri ke FEL metis sian stampon sur la ĝeneralanmovadon?

Tiujn sukcesojn ni dankas kompreneble nur al vi, al via fido, al via kunla-boro, al via persona intereso, al via peno.

Vi helpis nin, en malpli ol 5 jaroj !, atingi la lokon kiun ni nun okupas

I N F O R M I L O — Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto
Abono : BF 150,-

---

FLANDRA ESPERANTO-LIGO — Frankrijklei 140,2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00
Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

E S T R A R O

Edw. SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT 03/666 62 66
prezidanto/Informado, Planado/Agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK 03/827 24 ...
vic-prezidanto/interna revizoro/buĝetoj

Jules VERSTRAETEN, St. Bernardsesteenweg 1078
2710 HOBOKEN 03/827 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL 03/449 50 06
sekretario/kunordigado

Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35
2000 ANTWERPEN
direktoro de GCA/ librotenado

Kristin TYTGAT, St. Hatebrandstraat 8
2510 MORTSEL 03/449 50 24
reprezentanto FLEJA

K O M I S I I T O J

Hilde VANINGELGEM, Arbeidstraat 21, 9300 AALST
Trees DOOMS, Knaptandstraat 36, 2700 St. NIKL...
intergrupa agado

André STAES, Jan Denucéstraat 1/198 2020 ANTW...
kadrokursoj

Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2 2000 ANTWERPEN
literaturaj, tradukaj, eldonaj aferoj

Annie BOLLAERTS, Zomerlaan 16, 1500 HALLE
Herman DECEUNINCK, Floralaan 21, 1510 HALLE-BUIZINGEN
gazetara servo

Ivo DURWAEL, P. Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM
volontula servo

FAKAJ KUNLABORANTOJ

Wim DE SMET, Hertendreef 33, 2180 KALMTHOUT
sciencoj

Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33, 2180 KALMTHOUT
komputeraj aferoj

---



# VLAAMSE ESPERANTOBOND
# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

## K A D R O K U R S O J 1 9 8 2 - 1 9 8 3

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Sabaton 23 10 1982 | 09.00 - 10.00 h. | mallonga ekzameneto pri lingvokono | |
| | 10.00 - 16.00 h. | PAROLTEKNIKOJ fare de Paul Peeraerts<br>Publikaj paroladoj | |
| " 27 11 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekzameneto (se necese) | |
| | 10.00 - 16.00 h. | LITERATURO | Christian Declerck |
| " 18 12 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | INSTRUTEKNIKOJ | Emiel Van Damme |
| → " 22 01 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KUNVEN- kaj<br>DEBAT-TEKNIKOJ | Paul Peeraerts |
| ø " 05 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | HISTORIO | Fernand Roose |
| " 26 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KOMUNIKADO<br>Inform/propagand-teknikoj | Anne Tilmont |
| " 23 04 1983 | s a m e k i e l 2 6 0 3 1 9 8 3 | | |

ø Pro la Semajno de Internacia Amikeco, la kursoj ne povas okazi, nek je 19 02 1983, nek je 26 02 1983.

Por pliaj informoj : ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
André STAES
Jan BOVENDEERD

La kursoj okazos en ESPERANTO kaj estas alireblaj al ĉiu.

inter la diversaj landaj asocioj.

Dankon al vi ĉiuj.

Ĉu tio signifas ke ni atingis la pinton kaj ke nun ni povos ripozi ?
Ho, ke ne !
Tio jes signifas ke ni trovis la bonan direkton, la bonan manieron por daŭrigi, por "sori plu". Supren ! "Excelsior !"

Sed estas pli.

"Flandrio dissendas siajn filojn" jam estas konata devizo en Flandrio. Veras ke ankaŭ en la Esperanto-movado ni povas uzi tiun devizon. Estas jus nia prezidanto, Edward Symoens, nun faras trimonatan vojaĝon al Sud-Afriko. Li jam faris diversajn prelegojn kaj preparas pliajn en la venontaj semajnoj. Sukcese laŭ nia scio. Li metis kontaktojn kun oficialuloj kaj respondeculoj de universitatoj. Atendeble estas ke el tiu vojaĝo rezultos kelkaj bonaj kernoj el kiuj la movado povos plivastiĝi tra la afrika kontinento.

La antaŭvidoj en Belgio ankaŭ aspektas bonaj. Kontaktoj estiĝis inter alie kun la direktoro de la Instituto pri Modernaj Lingvoj de la Brusela Universitato kiu intencas okazigi simpozion pri Esperanto okaze de la 1984-a Monda Kongreso de la Internacia Organizo pri Aplikata Lingvistiko.

La agado en Flandrio havas pli kaj pli firman formon.

Farataj estas nun la lastaj paŝoj kondukantaj al la jam antaŭe menciita amasa kampanjo kadre de la kvinjara agadplano de UEA.

Ni ankaŭ planas kunvoki ĉiujn organizojn kiuj okupiĝas iasence kun Esperanto en nia teritorio por kune pri-ekzameni la eblecojn kaj por interŝanĝi ideojn pri la planita kvinjara agadplano prepare al la jubilea jaro.

Ke en la tuto multege valoras, eĉ nemalhaveblas via favora sinteno, via interEso, via helpo estas evidente.

Kiel vi povas helpi ?

Por komenci per favora reago al tio, kion petas de vi la estraro.
Ekzemple antaŭ nelonge vi ricevis la liston de via membraro en 1982 kun la peto kompletigi ĝin por ke ni sciu finfine pri kiuj homfortoj ni disponas.

Kion la estraro atendas de vi ?

Unue, aldoni la mankantajn informojn en la listo mem. Due, klopodi aligi tiom, kiom eble da novaj membroj (ekzemple el la kursoj). Trie - tre grave ! - klopodi retrovi kaj (re)membrigi ankoraŭ ne aliĝintajn aŭ iamajn ne plu aniĝintajn esperantistojn.

Jen propono :

# PROTOKOLO

PRI LA ESTRARA KUNSIDO DE SABATO 08 01 1983 EN ANTVERPENO, ESPERANTODOMO

Ĉeestas : Trees DOOMS (TD), Hilde VAN INGELGEM (HVI), Gerd JACQUES (GJ)
Roger DE SCHEPPER (RDS), Ivo DURWAEL (ID), Jules VERSTRAETEN (JV)
Jan BOVENDEERD (JB)

Malĉeestas : Edward SYMOENS (eksterlande) kaj Paul PEERAERTS (UEA-taskoj)

Prezidas : RDS
Protokolas : JB

## TAGORDO

1. La protokolo de la estrarkunsido de 18 12 1982 estas aprobita.

2. UEA-enketilo.
   Tiu ĉi estas komune plenigita. Kelkaj mankantaj elementoj estos alportitaj de la Esperanto-Centro. JB zorgos ke la dokumento estos sendita antaŭ la fino de la monato, kiel petite de UEA-CO.

3. FINANCOJ

3.1. La subvencidosiero por la ministerio estos preta venontan semajnon. Ĝi devos esti sendita antaŭ 15 01 1983. RDS havigos ĝin al JB antaŭ la 12-a kaj JB zorgos, ke ĝi estos ĝustatempe ĉe la ministerio.

3.2. ID anoncas ke F-ino Viviane MEERSMAN akceptis esplori la eblecojn pri reklamado en ESPERANTO PANORAMA por tiel trovi novajn enspez-eblecojn.

4. GAZETARA SERVO.

4.1. Annie Bollaert kaj Herman Deceuninck sendis detalan raporton pri siaj laboroj sur la gazetara tereno. Diversajn komunikojn ili sendis al diversaj ĵurnaloj el kiuj pluraj efektive aperis.
Ilia laboro estas tre bona.
Kompreneble kunkaboro estas ĉiam bonvena kaj eĉ necesa.

4.2. Krome ili faris kvanton da sugestoj al kiuj respondos ID.

5. INTERGRUPA AGADO

5.1. TD kaj HVI proponas okazigi la venontan estraran kunsidon en la provinco Orient Flandrio kaj profiti de tio por kunvoki ĝeneralan provincan kunvenon. Tio ĉi kiel unua agado tiudirekten, nome regule kunsidi en la diversaj provincoj por tiel krei pli koheran intergrupan agadon.

5.2. Ĉiu konsentas okazigi la kunsidon en Aalst.

5.3. Proponita programo :
- de 10.00 - 12.30 h. : estrarkunsido.

- je 12.30 : tagmanĝo
- je 14.15 h. promen-vizito tra la urbo
- ekde 15.00 h. ĝenerala provinca kunveno.

5.4. TD kaj HVI avertos kaj invitos la grupojn el Orient Flandrio, indikante la kunvenlokon ktp.

5.5. La estrarkunsido okazos ĉe HVI hejme. (Arbeidsstraat 21, Aalst)

6. KONGRESO 1983

6.1. ESPERANTO 2000 sendis provizoran programon kaj projekton de aliĝilo. JB kontaktos ilin por alporti la finajn adaptaĵojn.

6.2. Kongres-kotizoj
La kotizoj menciitaj en la antaŭa protokolo ne estas korektaj. Ili devos esti rekalkulitaj sur baze de novaj elementoj.

6.3.1. TD anoncas ke S-ro Coppieters principe akceptis fest-paroladi. Li antendas nun konfirman leteron kun indiko de la necesaj informoj.

6.3.2. Kontakti S-ron Coppieters ni petos de S-roj Gregoire Maertens aŭ Edward Symoens.
JB esploros tiun terenon.

7. SUBTENKARTOJ
estas pretaj. Ili nun estos traboritaj kaj kunigitaj en kajeroj por disponigo al estontaj disvendantoj. (vd antaŭajn protokolojn).

Fino : 16.30 h.

--------------------



FEL havas nun 659 verajn membrojn. Kial ne klopodi atingi 1.000 ?

Kion vi ankoraŭ povos fari ?

Vendi al personoj kiuj jes iasence favore reagas al la ideo de internacia lingvo sed ne havas ..?.. por lerni Esperanton, subtenkarton. Tiuj nun estas haveblaj en Esperanto-Centro. Bonvolu mendi kvanton. Tio alportos monon, tiel al vi mem, kiel al FEL. Tiel vi helpos kolekti la necesan monon por financi nian agadon.

Vere, se vi ne favore reagos al la alvokoj k.s. de la estraro, al kio fakte servos ties laboro ?

Ne forgesu , ke nia ĉies sukceso ankoraŭ - jes ankoraŭ, bedaŭrinde - dependas de v o l o n t u l a laboro. Por kompreni tion, ne necesas desegnaĵo, ĉu ?

Bonvolu do atente prikonsideri la proponojn de la estraro. Tamen ne hezitu reagi se vi ne konsentas kaj faru viajn sugestojn.

Bonvolu ankaŭ atenti pri la kadrokursoj, ĉar ankaŭ tie kuŝas granda parto de nia sukceso.

Bonvolu plie jam nun noti ke la venonta ĝenerala jarkunsido okazos sabaton 19-an de marto 1983 en Esperanto-Domo, Frankrijklei 140 ANTWERPEN ekde 14.00 h. kaj averti kaj inviti al ĝi viajn gemembrojn. Kvankam laŭ la statutoj ni devas kunvoki ĉiun individue, vi devas kompreni ke niaj financaj rimedoj ne permesos tion. Tial ni alvokas al via helpo.

Kalkulante je via ŝatata kunlaboro kaj komprenemo, sincere dankas kaj amike salutas

La estraro.

--------------------------

K O M U N I K O J

SKOLTA ESPERANTO-LIGO, U.P. RONALD, 45-10th AVE, ROXBORO, QUE, KANADO anoncas konkurson por la skoltoj kaj skoltestroj kiuj iros al la monda Jamboreo en Alberta, Kanado, venontan julion. La 25 plej bonaj Esperanto-parolantoj ricevos premion de 200 kanadaj dolaroj ( ± 7.500 BF).

La intenco estas reveki la intereson de la skolta movado al Esperanto, laŭ la rekomendo de la fondinto de la skolta movado, Baden-Powell.

------

UK 1983 - BUDAPEŜT

Kongresemuloj bonvolu noti ke S-ino R. Van Herck kaj F-ino I. Jacques planas aŭtobusan karavanon al Budapeŝt okaze de la venonta Universala Kongreso 1983.

Info : Rosette VAN HERCK
Gebr. Van Raemdoncklaan 88, 2520 EDEGEM

Ilse JACQUES
Molenstraat 29, 2000 ANTWERPEN

---------

Ni ricevis novjar-bondezirojn de ARMENA FILIO DE ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ - ARMENA SOCIETO DE AMIKECO.
Ni volonte sincere reciprokas al ili tiujn ĉi bondzirojn.

A L V O K O J

Komisiitoj kaj Fak-kunlaborantoj

bonvolu antaŭ fino de februaro 1983 havigi al la sekretario superrigardon de tio, kion vi klopodis/atingis en la pasinta jaro kaj pri tio kion vi planas en 1983.

Grupestroj

bonvolu, same antaŭ fino de februaro, havigi al la sekretario, cele al la kunmeto de la organigramo 1983, nomon, adreson kaj telefonnumeron, samkiel la kontnumeron de viaj :
prezidanto
sekretario
kasisto
administranto(j)/reprezentanto(j) en FEL ( 1 por ĉiu komenciĝinta kvindek da membroj je 31 12 1982.)

Dankon.

-----------

R E A G O J

Jen, de nia amiko Roland ROTSAERT en Brugge, serio da rimarkoj/sugestoj pro kiuj ni kore dankas kaj al kiuj ni klopodos tiuj respondi. Pri la aliaj ni intencas atenti en venonta estrar-/ ĝenerala kunsido.

1. Jam plurfoje okazis ke dum periodo de dek tagoj mi ricevis la revuojn Esperanto, Esperanto-Panorama kaj Informilo. Tio signifas : trifoje koverto, trifoje afranko. Ĉu ne eblas grupigi (almenaŭ kelkfoje).

   R. La elserĉado kaj grupigado kostas, pro tempoperdo, pli ol eventuala gajno.

2. Mi legis ke FEL aĉetis telefonrespondilon. Mi ankaŭ havas tian aparaton kaj mi spertis ke multaj homoj ne ŝatas paroli al surbendigilo. Eble oni ankaŭ en la Esperantocentro konstatis tion. Ĉu ne estas eble plivastigi la deĵorhorojn de E-Centro? Laŭ mi oni povus uzi la aparaton pli bone por transdoni informojn al la esperantistaro. Se oni regule surbendigas la movadajn novaĵojn kaj ŝaltas la aparaton ekz. de la 8-a vespere ĝis la 8-a matene, ni ĉiuj povas aŭskulti la aktualaĵojn.

3. Ankaŭ mi bedaŭras ke malmultaj personoj venas al la kadrokursoj. Kelkfoje mankas tempo kaj interesiĝo, sed oni ankaŭ pripensu ke (trajn)-veturo al Antwerpen kostas por mi pli ol 500 F. Kiamaniere mi plej bone uzas mian monon favore al la movado : per partopreno al kurso aŭ per aĉeto de iu libro? Nefacila demando ... Grupa aŭtoveturo estus malmultekosta, sed mi ne konas aliajn partoprenantojn en mia regiono. Ĉu ni skribu al S-ron De Croo pri tio ?

   R. Kiamaniere plej bone agi favore al la movado dependas laŭ ni de via persona prefero. Se vi volas kunlabori en la movada agado, ŝajnas al ni ke vi pli bone sekvus la kadrokursojn. Se tamen vi preferas helpi la movadon nur finance, vi verŝajne pli bone aĉetus librojn.

   Pri la kadrokursoj mem, ni jam esprimis la intencon okazigi ilin laŭ regione, tio signifas en lokoj proksimaj de la loĝloko de la partoprenantoj. Tio estas tamen ebla nur se estas sufiĉe da intereso. Ni esperis, ke sur provinca tereno ekestus la propaganda agado, sed konstatas ke tiu forrestis.

4. Kiaj estas la financaj rezultoj de UK ? Ĉu gajno aŭ malgajno ? Kio okazos al la malgajno ?

   Laŭ nia scio la kontoj ankoraŭ ne estas salditaj. Tamen tio ne estas FEL-problemo.

5. La Verda Stelo havas la plej interesajn programojn. Ĉu oni komunikas la gravajn programerojn al la aliaj grupoj, tiel ke ankaŭ ili povas inviti ekz. eksterlandan paroladanton kiu venos al Belgio ?

   Tutunue ni altiras la atenton al la flavaj folioj de ESPERANTO PANORAMA kie la tuta programo de LVS aperas.
   Aliflanke, estu al ni permesite, ke Ivo Durwael dum jaroj kolektis tion, kiom eble da programoj kaj adresoj de diversaj prelegintoj kiuj pretas prelegi ankaŭ aliloke. Li eĉ ĉiun jaron publikigis liston pri tio. Tamen li neniam aŭ preskaŭ neniam spertis ian interesiĝon.

Ni supozas ke LVS rezervos al via demando pli detalan respondon.

6. En Esperanto-Panorama troviĝas multaj informoj pri lingvaj problemoj, sed laŭ mi, nur malmultaj pri la movado. Ekz. mi neniam trovis ion en ĝi pri la deficito de FEL. Eble inter la legantoj estas personoj kiuj povas helpi, sed, se ili ne scias...

   Ĉar ESPERANTO PANORAMA aperas ne nur en Flandrio, sed ankaŭ en Nederlando, ni konsideris preferinde ne enmeti tiun problemon en le teksto mem de E-Panorama, sed aldoni apartan artikolon.Tio okazis antaŭ kelkaj monatoj. ( FEL, ĉu sufiĉe konata ?)

7. Mi foje demandis kial en la telefonlibroj oni ne aperigis "Esperanto" kaj la telefonnumeron de la respondeculo de la regiono. Respondo : oni faris tion antaŭ 20 aŭ 25 jaroj, sensukcese. Oni tamen forgesas ke tiutempe preskaŭ neniu havis telefonon, nun preskaŭ ĉiuj ! En ĉiu loko kiu havas la titolon "urbo" estu almenaŭ unu E-telefonnumero. Pagita mencio en la blankaj paĝoj verŝajne donos rajton al senpaga mencio en la flavaj paĝoj.

   Tiajn konsilojn FEL-estraro donis antaŭ ne longe. Laŭ nia scio nur Antwerpen favore reagis. Verŝajne ankaŭ aliaj, sed pri tio ni ne ricevis konfirmon.

8. En Esperanto-Panorama mi legas ke la membrokotizo estas 200 F. Se oni volas "kompletan" membrecon estas tamen preferinde fari donacon de 1250 F. En la lasta kunveno de Paco kaj Justeco la grupestro petis plian monsumon (inter 200 kaj 400 F., mi ne plu memoras). Mi ne pagis, unue ĉar mi ne volas pagi por atendi neakuratan prezidanton antaŭ ŝlosita pordo de ne hejtita kunvenejo, due ĉar mi neniam legis nek aŭdis ion pri tia decido. Mi komprenas ke kotizo ne sufiĉas por pagi la grupajn elspezojn, sed se plia kotizo estas necesa, oni anoncu tion en la oficialaj informiloj. La mencioj sur la blua kaj flavaj folioj de E-Panorama 78 (6) ŝajne estas oficialaj mensogoj. Pro tio mi furiozis ! Krome, se aldona kotizo por la loka grupo oficialiĝus, oni donu la eblecon pagi tion samtempe kun la donaco de 1.250 F.

   Komprenu ke FEL ne povas altrudi siajn prezojn al la grupoj. La kotizoj komunikitaj al vi pere de la oficialaj informiloj estas tiuj fiksitaj de la ĝenerala kunsido. Ili estas la minimumaj kotizoj de FEL. Se la grupoj opinias, ke ili ne povas sekvi,ili mem decidu pri tio.

---

Ni kun danko konstatas ke iom post iom niaj gelegantoj ekuzas INFORMILON por esprimi siajn ideojn. Jen finfine la celo de nia revueto. Ĝi estu vera kontaktilo, vera komunikilo por ĉiuj inter ni.